

# Svisa Esperanto-Societo informas

1999 numero 1-a: januaro / februaro / marto

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

## Vivo de SES

### La Estraro informas

La Estraro kunvenis la 7an de novembro 1998 en Bern kaj diskutis tre vigle dum 4 horoj pri demandoj kaj problemoj de SES. Ni resumas la debatojn kaj decidojn, por ke la membroj povu sekvi la societatan aktivadon.

#### Agotago 98

Laŭ informoj ricevitaj la grupoj de Genève, Lausanne, Bern, Basel, Luzern kaj Wil enketis surstrate baze de la koncepto ellaborita de la laborgrupo pri varbado. Tio estas surpriziga partopreno kaj signo de kunlaboremo. Post ricevo de la plenigitaj enketiloj ni analizos kaj resumos la rezultojn por ĉerpi finajn konkudojn. Krome, kiel oni povis legi en *SES informas* 98-5, Lucerna Espe-

ranto-Societo organizis standon meze de la urbo.

#### Novaj leterkapo kaj informiloj

La provaĵoj estas aprobitaj kaj prespretaj. Temas pri nova leterpapero (la ĝisnuna elĉerpiĝis), pri mesaĝ-folio (anstataŭ letero), pri kontakt-karteto en formo de vizitkarto kun slogano, kaj pri SES-prospekto. Rolf Ernst grafikumis la presajojn.

#### Gazetara servo

Bedaŭrinde la gazetara servo denove stagnas. Andy Künzli ĉesis la germanlingvan eldonon kaj franclingve tiu funkcio vakas. Ni serĉas personojn kun ĵurnalista inklino kaj esperas trovi solvon.

Antaŭ jaro ni ne plu reabonis al ARGUS kaj petis la membraron kolekti kaj sendi artikolojn al ni. Nun ni konstatas kontentaj, ke membroj sendas eltranĉaĵojn al ni, samkvante kiel tion faris ARGUS.

Ni daŭrigu kaj rememorigu okaze pri tiu observado.

### **Manifesto favore al la lingvoj**

Mireille Grosjean sugestis dissendi la manifeston kun *SES informas* kaj rekomendi al la membroj subskribi ĝin. Ni opinias, ke estas pli efike, se la Estraro subskribas ĝin, eĉ ni decidis aliĝi kiel membro pro publik-rilataj kaŭzoj. Tiel ni estos informataj pri la aktivecoj de la Fondumo *Lingvoj kaj Kulturoj*, poŝtfako 120 en Comano (Tiĉino). Vidu la ĉi-koncernan artikolon en tiu ĉi numero de *SES informas*.

### **Jarkunveno de JES**

Nicole Margot reprezentis SES-on en la jarkunveno de Junularo Esperantista Svislanda okazinta la 21an de novembro 1998 en Lausanne. Ni konstatis kun bedaŭro, ke ni elektis la saman daton por la organizo de la merkatika tago. La kunlaboro kun JES ne ankoraŭ estas sufiĉe fruktodona parte pro la foresto en eksterlando de JES-komitatoj.

### **Forumo por Esperanta Civito**

Nome de SES Nicole Margot partoprenis en La Chaux-de-Fonds la 8/9ajn de aŭgusto 1998 la Forumon por la Esperanta Civito. Ŝi verkis detalan raporton, kiun la Estraro diskutis. Nicole Margot kaj Bruno Graf esprimas rezervojn al la proponita pakto,

ĉefe rilate al la paragrafoj 4 kaj 12. La prezidanto rekomendas ne ratifi la pakton kaj observi la pluan evoluon de la projekto. Oni povos legi pri tiu aranĝo en *Literatura Foiro* aŭ en *Heroldo de Esperanto*.

### **Varbado**

La laborgrupo pri varbado ekzamenis aktualajn varbilojn. Por tuj havi ion por la agotago ni mendis 1000 kolorajn kaj nigra-blankajn varbilojn germanlingvajn al Germana Esperanto-Asocio. La koloraj kunhavas gluetikedojn kun la SES-adreso. La nigra-blankaj surhavas nian adreson. Ambaŭ estas tre moder-prezaj. Kiu estas interesita, tiu petu ekzempleron al la prezidanto. Franclingve ni rekomendas uzi la varbilojn de JES.

Ree ni planas varbi membrojn inter la 250 personoj, kiuj anas al la lokaj grupoj, sed ne al SES. Ni antaŭvidas inviton pere de lokaj bultenoj aŭ per rekta alskribo. La kasistino anoncis kreskon de la membrostato, kio estas kuraĝiga kaj montras, ke niaj klopodoj ne estas vanaj.

### **Kapitale ĉe GEP**

Laŭ cirkulero de KCE GEP vendis la antaŭlastan domon al arkitekto kaj intencas vendi la lastan al KCE, kiu volas aĉeti ĝin transprenante ĉiujn ŝuldojn. Kondiĉe ke la aliaj kreditantoj konsentas, la Estraro decidis

ankaŭ transigi nian krediton de CHF 15'541 al KCE, konforme al la decido de la Ĝenerala Kunveno en 1997.

### **Mendo-kontrakto kun LF-koop**

Ni renovigis kaj adaptis la mendo-kontrakton por *Literatura Foiro* reduktante la abon-nombrojn de 227 al 200, kio signifas ŝparon de CHF 648. Membroj rajtas elekti *Heroldon de Esperanto* anstataŭ *Literatura Foiro* aŭ ricevi ambaŭ gazetojn kontraŭ krompago menciita en *SES informas* 1998-4.

La prezidanto : Bruno Graf.

## **Paŝo al kunlaboro**

*Fondumo Lingvoj kaj Kulturoj* en Comano (Tiĉino) estas la plej aktiva kaj trafa defedanto de la iama lingvopolitiko svisa, kontraŭ la nuna konfederacia tendenco privilegiema al la angla. Temas pri serioza instanco, kiu ricevas apogon, ankaŭ financan, kaj respekton de la tuta lingvofaka Svislando, ĉefe ĉe plurlingvaj kleruloj kaj specialistoj pri lingvo-instruado.

La fondumo lanĉis, en la kvar svisaj idiomoj, « Lingvo-manifeston » kiu pledas por « lingva pliperfektigo en spirito de malfermiteco, prepare al la nova jarmilo ».

Kvankam la Manifesto ne mencias esperanton, ĝia spirito estas de apogo al la kultura valoro de la diversaj lingvoj kaj de ties fratiga rolo en Svislando. Tial eblas antaŭvidi en estonteco favoran atenton pri nia lingvo : pri ĝi jam aperis en la fonduma revuo *Babylonia* ampleksa artikolo de Tazio Carlevaro. Li persone estas membro de la fondumo.

Tion konsiderinte la estraro de SES decidis oficiale subskribi la Manifeston kaj aliĝi al la Fondumo, por konkrete montri la vivantecon de nia lingvo kaj la kulturajn, sociajn kaj pedagogiajn interesojn de la asocio, kiu flegas esperanton en Svislando.

Kiu volas same fari sin adresu al :

Fondazione : Lingue e Culture  
Stiftung : Sprachen und Kulturen  
Fondation : Langues et Cultures  
Fundaziun : Linguatgs e Culturats,  
CP 120, CH-6949 COMANO.

Nome de SES : Perla Martinelli

## **Kotizoj/abonoj 1999**

Alvoko de la kasisto!

En tiu ĉi eldono de *SES informas* vi trovas kiel kutime enpagilon (653677-40) por pagi vian kotizon aŭ abonon por 1999. Mi afable petas, ke vi faru tion kiel eble plej rapide kaj ne pli malfrue ol fine de junio 1999 !

Bonvolu nepre ĉiam indiki sur la enpagilo, kion vi pagas, do ekzemple :

«*Kotizo 1999*» aŭ «*Abono 1999*» aŭ «*Donaco*».

La kotizo inkludas abonon al *Literatura Foiro* (LF) kaj al *SES informas* (SESi).

CHF 12.- infanoj ĝis la 18a jaro  
25.- gejunuloj ĝis la 29a jaro  
70.- ceteraj membroj  
100.- geedzoj  
45.- emeritoj, pensiuloj  
65.- geedzoj emeritaj  
1400.- dumvivaj membroj  
900.- dumvivaj membroj emeritaj  
25.- abono de SESi sen SES-membreco.

Tutkoran dankon pro baldaŭa pago!

La kasisto: Barbara Pochanke

## Donacoj

La kasisto Barbara Pochanke dankas pro la sekvaj donacoj:

Al konto 33 SES:

Anonima: CHF25.-; Nicole Margot: 40.-

Al konto 34: «Agado 2003»:

Sonja Brun: 20.-

## SES-Agendo 1999

La antaŭvitita laborkunveno en Bern ne okazos la 13-an de februaro kiel anoncite en *SES*

*informas* 98-5, sed la 6an de marto, kiel vi legos en la sekva rubriko.

**15-an de majo 1999:** Ĝenerala Kunveno de SES en Zürich kun rendevuo de aktivuloj kaj kultura temo. Detalaj informoj aperos aprile en *SES informas* 1999-2.

## Ĉu esperanto havos ŝancon en Svislando?

Jen demandas svisaj esperantistoj. Granda parto de niaj membroj pasivas aŭ rezignacias. Esperanto ŝajnas esti bela revo, dezirpensado, pasio de fantaziuloj. Efektive ni trairas krizan periodon kaj apenaŭ kredas je novaj horizontoj. Ankaŭ lokaj grupoj baraktas. La usona-angla lingvo inundas kaj voras la naciajn lingvojn kaj kulturojn.

Krizo igas pripensi kaj diagnozi la situacion. Krizo malkovrigas ankaŭ ŝancojn. Ekkoni la problemojn helpas trovi solvojn. Tial ni kunvokas ĉiujn al laborkunveno.

## Laborkunveno

6an de marto 1999, 10h30-16h30

Bern

hotelo National, Hirschengraben 24

1.

Prelego de dro Tazio Carlevaro pri «Ekal komuna lingvo ; ĉu sen

esperanto ? La preleganto analizos la lingvan situacion en Svislando kaj la antaŭeniron de la angla en ĉiujn sferojn.

2.

Prezento de strategiaj pripensoj fare de Perla Martinelli kaj Bruno Graf. Ambaŭ komentos la mal-facilaĵojn kaj ŝancojn de esperanto en Svislando kaj tiros konkludojn.

3.

Estraranoj de lokaj grupoj, de TEL, JES, SAEF kaj KCE resumos la ĉefajn problemojn kaj eblojn en la propra kampo.

4.

Ĝenerala diskuto. Se oportune trakto de iuj demandoj en labor-grupoj.

La estraro de SES konforme al sia celaro serĉas novajn vojojn kaj perspektivon por esperanto en nia lando.

**La partopreno estas senkosta. Bonvolu aliĝi per la sendo de la sekva aldona talono trovebla ene de la revuo :**

**Por aliĝi simple deprenu la aliĝilon, kiu estas aldonita ene de tiu ĉi numero de SES informas kaj sendu ĝin al Svisa Esperanto-Societo, Jurastr. 23, 3063 Ittigen.**

**Aldonaj Informoj estas riceveblaj telefone : 031 921 44 59.**

# C.D.E.L.I

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33,  
2305 La Chaux-de-Fonds. ☎ : 032 967  
68 55. Fakso: 032 967 68 29.

## Jara raporto

En 1998 registriĝis 810 novaj bibliografiaj unuoj : tiu riĉiĝo de la kolektoj de CDELI rezultas el donacoj de verkistoj, de eldonejoj, de redakcioj, de unuopaj esperantistoj kaj ankaŭ el interŝanĝoj de duoblaĵoj kun aliaj dokumentejoj. La tutan praktikan laboron plenumas bonvolemluloj. Dediĉas al ĝi Claude Gacond po 20 horojn semajne kaj lin helpas ĉiumerkrede lia edzino Andrée Gacond kaj lia bofratino Cosette Sandoz, kiuj registras la periodaĵojn kaj katalogas la librojn. De tempo al tempo venas feriantoj pretaj alporti sian helpon dum parto de la tagoj : matene helpi, posttagmeze migradi en Ĵuraso, ĉu ne estas bela feri-formulo por esperantistoj !

Fakuloj alportas gravan teknikan helpon per siaj utilaj konsiloj : la poliglota interlingvisto Tazio Carlevaro en Bellinzona, la slavisto kaj interretisto Andreas Künzli en Bern kaj la tradukisto Dietrich Weidmann en Zürich. La komputistoj Jean-Marie Gacond en Neuchâtel, Michael Wettstein en Cernier kaj Cédric Raymond en La Chaux-de-Fonds helpas por la instalado kaj funkciigo de la

kataloga sistemo *Bibal*, kies aĉeto aŭtوماتigos la bibliografian registradon kaj ebligos redaki la delonge atendatan *Bibliografion de Esperanto kaj Interlingvistiko laŭ la kolektoj de CDELI*. Eldoniĝos *temaj kajeroj*, kiuj povos diskonigi ne nur presaje, sed ankaŭ interrete.

En 1998 la vizitantoj kaj esploristoj venis el Germanio, Britio, Bulgario, Estonio, Francio, Hungario, Israelo, Italio, Kroatio, Nepalo, Pollando, Sudkoreio, Usono kaj Svislando mem. Kelkaj el ili restadis plurajn tagojn ĝuante pri la riceco kaj graveco de la CDELI-kolektoj.

Komputiko certe faciligos la kreskadon de la nombro de la kunlaborantoj, kiuj povos plenumi sian taskon grandparte hejme kaj per interreto registrigi la rezulton de sia laboro. Semajnfinoj de la bona volo kaj interretaj konversacioj ebligos startigi tiujn tre teknikajn kunlaborojn intelekte certe ege riĉigajn. Sed ne nur komputilistoj estas bonvenaj. Utilaj taskoj atendas helpemulojn, kiuj estus pretaj regule veni surloken por ordigi gazet-eltranĉaĵojn, indeksi periodaĵojn, kontakti eldonistojn, danki al donacintoj, ktp, ktp. Ni rememorigas, ke ekde sia emeritiĝo dum pli ol 25 jaroj Gabrielle Gacond venadis ĉiusemajne el Neuchâtel por ordigi la artikol-eltranĉaĵojn

kaj Mathilde Lüthi dum 15 jaroj el Areuse por registri la alvenantajn periodaĵojn. Ambaŭ ŝategis plenumi sian utilan funkcion. Ĉu anonciĝos novaj emeritoj kunlaboremaj por ilin anstataŭi ?

CDELI ankaŭ bezonas monan helpon. Konsiderante la ĝisnunajn atingojn de CDELI espereble kelkaj malavaruloj esprimos la deziron alporti sian financon kunlaboron al la entrepreno, tio por helpi al Claude kaj Andrée Gacond, ke ne nur el ilia propra monujo troviĝu la financaj rimedoj por la akiro de la perkomputila kataloga sistemo *Bibal*.

La Biblioteko de la Urbo ne povas subvencii tiun ĉi aĉeton. Ĝia financa helpo rilatas al disponigo de konvenaj laborejoj kaj konservejoj kaj de ĉiuj necesaj laboriloj: slipoj, skatoloj, movbretaroj ktp, kaj per konstanta apogo teknika fare de la direkcio, de bibliotekistoj, de bindistoj, kaj per la kovrado de la administraj kostoj telefonaj, telefaksaj, poŝtmarkaj, paperaj, ktp, kaj fine per la senpaga disponigo de kunvenejoj por la fakaj kunsidoj kaj por la organizo de kolokvoj en kunlaboro kun esperanto-organizaĵoj.

# K.C.E.

**Kultura Centro Esperantista**  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311, 2301  
La Chauv-de-Fonds. ☎ kaj fakso: (032)  
926 74 07.

## Venontaj Monatfinoj

**Februaro 20/21** : *Esploroj pri la  
zamenhofa ideologio* kun François  
Degoul.

**Marto 27/28** : *Kien Ruslando ?*  
Provos respondi la hungara  
ambasadoro Nanovszky.

**Aprilo 24/25** : *La bona lingvo.*  
Renkonto kun Claude Piron.

## Raporto 1998a

El la raporto pri la aktiveco  
1998a, kiu estis dissendita al la  
apogantoj kaj membroj de la  
Kultura Konsilio ni diskonigu  
tiujn ĉi sciigojn :

La donacoj atingis CHF 27'376.

La komitato, kiu kunvenis 4  
fojojn, daŭre konsistas el David  
Bühlmann, prezidanto, Jaqueline  
Vasserot, vicprezidantino kaj  
Giorgio Silfer, sekretario.

Aperis 9 numeroj de *Monata  
Cirkulero*.

Okazis 8 sukcesaj montfinoj kun  
meznombre po 8 partoprenantoj.  
Tiu de septembro ne okazis pro  
nesufiĉa nombro da aliĝoj. Ankaŭ  
indas menci la jarfinajn aranĝojn  
kaj je la 15a de decembro  
Zamenhofan Feston kun lokaj

esperantistoj honore al la 30a dat-  
reveno de la fondo de KCE

Giorgio Silfer prizorgas litera-  
turan kurson per korespondan, kiu  
havas jam 4 aliĝojn.

Fine de marto KCE fariĝis  
privata esperanto-lernejo laŭ  
agnosko en kontrakto kun la  
Budapeŝta Teknika Universitato  
Eötvös Lorand.

Unua ekzamena sesio de la Svisa  
Esperanto-Ekzameno efektiviĝis  
en aŭgusto. Sukcese trapasis la  
unuan gradon Anna Lászay el  
Hungario kaj Konrad Rey el  
Luzern. La ekzamenantoj estis  
Claude Gacond, Perla Martinelli  
kaj Giorgio Silfer.

Ankaŭ en aŭgusto sukcesa  
aranĝo estis la gastigo de la unua  
Forumo por la Esperanta Civito.

Ekde 1995 la administrado de  
KCE estas prizorgata de volont-  
uloj trejnitaj de LF-koop. En 1998  
deĵoris Judit Felszeghy, Anna  
Lászay, Andrzej Nawrocki,  
Tamás Szabó, Ljubomir Trifon-  
čovski, kiuj venis el Hungario,  
Bulgario kaj Pollando.

**Okaze de sia 30-jara datreveno  
KCE, proponas al la SES-  
membroj eksterordinaran  
rabaton por la akiro de la  
sekvaj libroj :**

**Le Docteur Esperanto**, Ziolska,  
anstataŭ : CHF 12, nur 4

**Marta**, Orzesko : anstataŭ 5, nur 2.50

**Cours d'Esperanto**, kajer-serio 1-6,  
sen disko : anstataŭ 5, nur 2.50

**Hamlet**, trad. Zamenhof : anstataŭ  
15, nur 10,90

**Fundamento**, Zamenhof : anstataŭ  
15, nur 7.50

**Wie lernen Esperanto I** : anstataŭ  
19.30, nur 9.65

**Karnavaleto**, Tzaut, disko : anstataŭ  
18, nur 9

**Aventuroj de Pioniro**, Privat :  
anstataŭ 11.40, nur 8.55

**Esperanto, einmal anders**, W.  
Auld : anstataŭ 3, nur 1.50

**Vortaro Franca – Esperanto** :  
anstataŭ 25, nur 18.75

**Homo**, Mizelaitis : anstataŭ 5, nur  
2.50

La librojn eblas aĉeti en KCE,  
(strato Postiers 27, 2301 La  
Chaux-de-Fonds ☎ : 032 926 74  
07) dum labortagoj ekde lundo  
posttagmeze (marde – merkrede -  
ĵaŭde inter la 8h30 – 12h30 kaj  
16h30 – 19h30, lunde ekde la 17h,  
vendrede ĝis la 12h).

Laŭ via mendo KCE sendos ilin  
ankaŭ poŝte, sed la kalkulata  
liverkosto estas la 10% de la  
originala prezo, almenaŭ CHF 2.

Por la partoprenantoj de kursoj kaj  
Kulturaj Monاتفinoj KCE vendas  
multajn pliajn librojn kun 10%  
rabato !

### **Universala Esperanto-Asocio**

Memoru ke la ĉefdelegito por  
UEA en Svislando estas Sonja  
Brun, Waldegstr. 28, 6343  
Rotkreuz. Tel. : 041 790 46 40.

# Movada vivo

## Basel

### **Esperanto-Societo Basel**

PF 103, 4005 BASEL. ☎ : 0049 76 214  
57 12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim,  
Neubad.

Detala jarraporto de la  
**prezidanto** aperis en la januara  
numero de *Kuriero de Esperanto*.

### **Venontaj kunvenoj :**

#### **Februaro 2an**

**23an** : Esperanto-kurso por  
komencantoj, Haltinger strasse 97.

**Marto 3an** : Komuna legado kaj  
ludoj

En via agendo notu la postajn  
kunven-datojn : 22.4 ; 27.5 ;  
24.6 ; 22.8 ; 23.9 ; 28.10 ; 25.11  
kaj 11.12.

## Genève

### **Esperanto-Grupo "La Stelo"**

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎ : 022 740  
04 45.

### **Madeleine Stakian honorigita**

La 24an de novembro 1998 22  
samideanoj renkontiĝis por  
vespermanĝi honore al Madeleine  
Stakian, kiu multjare prezidis la  
grupon « La Stelo ». Anita Altherr  
rememorigis ŝian rolon favore al  
esperanto en Genève, kaj tiujn de



Edmond Privat, Hans Jakob kaj Claude Piron. Poste Yvonne Cotton kaj Bernard Wechter deklamis poemojn de Mad Mevo, kiuj estis premiitaj de la Katalunaj Floraj Ludoj en 1935. Madeleine Stakian emocie dankis rememorigante pri sia edzo Ardachès forpasinta en marto. Sekvis vendo de 45 ekzempleroj de la broŝuro «*»Dek fabloj de Jean de La Fontaine*» tradukitaj de Mad Mevo, kiun ĵus eldonis la Presejo Sixtus-Pot.

Laŭ *Brasikfolio* 1998-11.

## Lausanne

### Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎ :021 729 58 02. E-mail: lausanne . ch @esperanto. nu. Homepage: <http://www.esperanto.ch>.

**Monataj kunvenoj:** 20h30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo. **Diskuta rondo:** ĉiumonate je la tria lundo en hotelo Continental inter la 18h00 kaj la 20h00.

**Notu la datojn de la venontaj kunvenoj:** **Februaro 8an:** Ĝenerala Asembleo. La protokolo pri la asembleo 97a aperis en la laŭzana informilo 99-1.

**Sekvaj datoj:** 8 marto, 12 aprilo, 3 majo, en junio okazos ekskurso, 6 septembro, 4 oktobro, 8 novembro kaj 12 decembro: **Zamenhofa Festo.**

## Luzern

### Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke. ☎ :041 280 46 12.

**Kunvenoj:** la duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

**Paroligaj kunvenoj kun Franz Brügger** la unuan merkredon de la monato: 14h00-16h00 en la restoracio Big Ben, Winkelriedstr. 39.

**El la prezidanta raporto ni menciuj la sekvajn okazaĵojn:** La 15an de decembro 1998 mortis Hanspeter Isaak en la aĝo de preskaŭ 62 jaroj. LES nun nombras 19 aktivajn kaj 14 pasivajn membrojn. Okazis 8 kunvenoj en la restoracio Emmenbaum kun partopreno de meze 9 LES-anoj. La ekskurso okazis per ĉaro tirata de ĉevaloj. Sonaj Brun protokolis ĉiujn renkontiĝojn. Franz Bigger gvidis 10 paroligajn kunvenojn en Big Ben. Malgraŭ la propagandaj agadoj kursoj ne altiris aliĝantojn. La estraro kunvenis 4 fojojn. Koni Rey, kiu okupiĝas pri la montro-fenestro de SAEF en la lucerna stacidomo, partoprenis sukcese en la baza ekzameno de SES/KCE.

## **Venontaj kunvenoj en 1999 :**

**Februaro :3an** en Big Ben.

**19an :** Ĝenerala Kunveno en la restoracio St. Christoph, Rothenburgstr. 45, Emmenbrücke.

**Marto : 3an** en Big Ben.

**18an :** Kio kaj kia estas briĝo kun Renata Filali.

**Aprilo : 7an** en Big Ben.

**15an :** Literatura vespero kun Sonja Brun.

**Majo : 5an** en Big Ben.

**20an :** Rudolf-Steiner-Lernejo dekjara kun Monika Ruckli.

**Junio : 2an** en Big Ben.

**17an :** Historio kaj fabrikado de ĉokolado kun Annelies Dettling.

**Julio : 7an** en Big Ben.

**10an :** Ekskurso kun Anĝelo Mellini.

**Aŭgusto : 19an :** Promenado kun Margrit Scherer.

**Septembro : 1an** en Big Ben.

**16an :** Pri 4 komponistoj, kiuj mortis antaŭ 400, 200 kaj 100 jaroj kun Paul Scherer.

**Oktobro : 21an :** Raporto pri la 84a UK en Berlino kun Margrit kaj Paul Scherer.

**Novembro : 3an** en Big Ben.

**18an :** Festeto kaj kompilado de la programo por la jaro 2000 kun Paul kaj Margrit Scherer.

**Decembro : 1an kaj 5an** en Big Ben.

## **Neŭŝatela Kantono**

### **Studo de esperanto en La Chaux-de-Fonds**

En la salono de C.D.E.L.I, Biblioteko, pordo nord-orienta. ☎ : 032 967 68 55.

Venontaj studvesperoj de la 19h45 ĝis la 21h45 :

**Februaro** mardon 9an kun Claude Gacond kaj merkredon 24an kun François Degoul.

**Marto** merkredon 10an kaj 24an.

## **Wil**

### **Esperanto-Klubo Wil**

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil.  
☎ :071 911 68 30. **Kunvenoj:** 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

Kunvenoj:

**6an de januaro:** V. Chaves-Walder kaj L. Siegrist rakontos pri la 6a Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno en Hispanio.

**2an de februaro :** Ludvespero kun L. Sennhauser.

**3an de marto :** Forumo por la Esperanta Civito kun S. Pochanke.

### **Deziras korespondi kun svisa esperantist(in)o :**

Ludmila Zimová, Pazderkova  
933/3, 460 06 Liberec VI, Ĉeĥa  
Respubliko.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH, ☎ :01 25 150  
25. Kunvenoj: 19.15, Eisengasse 22,  
8034 Zürich

**Ekde la 1-a de aprilo 1999 la klubejo troviĝos ĉe Akazienstrasse 6, 8008 Zuriko.**

**Kunvenoj:** .

**1999 februaro 6an:** 14h00 komenciĝo de la kuba danckurso por komencantoj (6 x 2 h.) Bonvolu aliĝi.

**Februaro 8an:** 19h15 : ĝenerala kunveno. Tagordo : Protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno. Raporto de la komitato. Raportoj de la kasisto kaj kaskontrolantoj. Malŝarĝo de la komitato kaj elektoj. Kotizoj. Buĝeto. Decido pri proponoj. Diversaĵoj.

**Marto 8an:** Anita Altherr montras lumbildojn kaj parolas pri la temo : De insulo al insulo en la Egea Maro.

**Aprilo 12an:** Klubejo Akazienstr. 6, 8008 Zuriko : Monata kunveno. Inaŭguro de la nova klubejo kaj de la nova esperanto-librejo, kun aperitivo.

**Majo 8an:** 14h00, Klubejo Akazienstr. 6, 8008 Zuriko : Komenciĝo de la esperanto-kurso por komencantoj (6 sabataj post-tagmezoj)

**Majo 15an kaj 16an :** Tutsvisa Esperanto-Kongreso. Klubejo Akzienstr. 6, 8008 Zuriko.

## Esperanta familia rondo

Ni kunvenas ĉiumonate la unuan sabaton je la 14h30 ĉe familio

# Libro

## Grava interlingvistika dokumento

Por jubilei la 30an naskiĝjaron de CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, Tazio Carlevaro publikigis en 1998 sub la franclingva titolo "*Domaine de la recherche en linguistique appliquée: Contributions*" la prelegojn, kiuj estis prezentitaj kadre de la dua Interlingvistika Kolokvo de CDELI okazinta en 1996 inter la 2a kaj 5a de novembro. En tiu 235paĝa bel-aspekta dokumento la enkonduko kaj la resumo de ĉiuj diskutoj estas verkitaj en la franca lingvo dankal la traduka kunlaboro de Mireille Grosjean, dum la raportoj mem respregulas en kiu lingvo sin esprimis la prelegintoj, ĉu en esperanto, ĉu en la franca.

En tiu kolokvo la honora gasto estis Deltlev Blanke (Berlin). *Pri la aktuala stato de interlingv-*

**istiko** li raportis. Lia kontribuo, kiu okupas preskaŭ la duonon de la libro, konsistigas epokfaran dokumenton. Ĝi liveras panoraman vidon super la okazintaĵoj, la nunaj problemoj, la aperintaj verkoj kaj diversaj planlingvaj agadoj realigindaj.

Sekvas serio da same interesaj kontribuajoj:

Giorgio Silfer (La Chaux-de-Fonds / Milano) recenzas la itallingvan enciklopedian vortaron de Paolo Albani kaj Berlinghiero Buonarroti pri la inventitaj lingvoj ***Aga magera difura*** (1994).

Tomasz Chmielik (Swidnik, Pollando) faris du raportojn. Unu malkovrigas al ni la personecon kaj laboron de ***Samuel Bogumil Linde*** cele al ***provo krei inter-slavan esperanton***. Lia dua eseo temas ***Pri la jida gramatiko de Zamenhof***, kiu datumas de 1879.

Alain Favre (Douvaine, Savojo) en la franca lingvo sub la titolo ***Espéranto et sciences naturelles***, post konciza prezento de la biologia latinlingva nomenklaturado internacia, prezentas kelkajn tre bone dokumentitajn proponojn rilate al la scienca esperantonomenklaturado. Tiu lia eseo estas tre verŝajne inter la plej signifaj de la tuta kolokvo. Ĝi altiru la atenton de ĉiuj esperantistoj okupiĝantaj pri scienca nomenklaturado.

Sub la titolo ***Tranfert en espéranto*** Natalia Dankova-

Stackler (Paris) raportas pri la tiama stato de siaj psikolingvaj esploroj efektivigataj en la universitato Université de Paris VIII.

Tazio Carlevaro (Bellinzona) alportas unuajn informojn pri sia vasta socilingva enketo pri la svisa esperantistaro. Unuafoje oni ricevas realan bildon pri la konsisto demografa, lingva, intelekta kaj kultura de la esperanto-publiko.

Mireille Grosjean (Les Brenets) mencias kelkajn surprizajn faktojn proprajn al la interkulturaj rilatoj en Svislando.

Vera Barandovská Frank (Paderborn, Germanio) donas al ni ideon pri la laboro kaj personeco de la interlingvisto ***Erich Werfeling***.

Andreas Künzli (Bern) skizas sian projekton pri ***Svisa Planlingva Enciklopedio***.

Povu tiu rapida prezento de la verko ***Domaine de la recherche en linguistique appliquée*** instigi legantojn de nia revueto konscii pri la graveco de tiu libro kaj de la eldonista laboro de Tazio Carlevaro. Por akiri tiun libron oni sin turnu al ***Éditions Hans Dubois*** Dr T. Carlevaro, Viale Motta 32, 6500 Bellinzona.

# Raportoj

## **Merkatika tago en Bern 21an de novembro 1998**

Ĉu surmerkatigi esperanton (r)estas revo?

Jes, pensas esperantistoj, kiuj jam provis interesi homojn pri esperanto kaj organizi kurson. Ili konas frustrigon post vanaj klopodoj.

Ne, respondas Marco Picasso, se vi aplikus vere agnoskitajn metodojn de informado.

Ĉu tio estas teorio?

Verŝajne, kiel montris la merkatika tago de SES la 21an de novembro en Bern.

Kiom da aktivuloj ni estas?

Ne multaj laŭ partopreno. Tamen estis reprezentitaj la grupoj de Bern, Genève, Ĵuraso, Lausanne, Luzern, Zürich kaj Wil. Nur mankis Basel kaj kelkaj responsuloj.

Marco Picasso montris, surbaze de germana varbilo, kiel teksti informilon: levi problemon, vekti intereson, prezenti solvon, montri avantaĝojn.

Pro la multaj demandoj kaj la viglo de la diskutoj la preleganto apenaŭ povis sekvi sian planon. En la dokumentoj disdonitaj troviĝis dekalogo de bona informisto represita sensanĝe sur la 4 sekvaj

paĝoj. Tiel ankaŭ la neĉeestintoj povos profite apliki ĝin.

La prezidanto: Bruno Graf.

## **Kvinpetalo**

F-86410 Bouresse  
(Francio)

### **Esplora tra tipaj momentoj de la esperanto-aventuro**

laŭ orientiĝo didaktika,  
interlingva, vortara, gramatika,  
beletra kaj historia

#### **kun Claude Gacond**

por la esperanto-studemuloj kaj  
esperanto-instruantoj

**La du periodoj 13/17aj kaj  
20/24aj de aprilo 1999** estos  
komplementaj. Ĉeesto en ambaŭ  
estos plej profitiga, sed parto-  
preno en parto el ili estos ankaŭ  
kulture riĉiga.

### **Esperantujo-Tendumejo**

La loko kie oni kuraĝigas la komencantojn kaj forpelas la krokodilojn. Tiele ĉe: Hans Kästli, Esperanto-Tendumejo, Brendenstrasse 11, CH-9424 Rheineck. Ebleco lu-preni ĉambron, loĝvagonon, kabanon. Por unuopuloj ebleco perlabori sian restadon.

# LA DEKALOGO DE LA E-INFORMISTO

Kelkaj sugestoj por la “vendistoj” de Esperanto

*La subaj sintezaj sugestoj simple resumas taktikojn (ne strategiojn!), kiujn normale oni devas uzi en la ĉiutaga entreprena komunikado por efike prezenti kaj klopodi ‘vendi’ sian varon aŭ servon. La samaj estas aplikeblaj al esperanto. (nur pro simpleco mi uzas li anstataŭ li/ŝi)*

## 1. Oni vendas la homon antaŭ la varon.

- plej grava virto por tiu, kiu devas konvinki pri io NE estas kapabli paroli, sed kapabli aŭskulti kaj kompreni la reagojn de la ‘kliento’.
- neniam alfrontu la aliulon kun drama vizaĝo, sed pozitive, montru vian trankvilan sekurecon.

## 2. Konu bone vian produkton.

- ĉu vi certas, ke vi konas vere kaj bone *kian esperanton* vi intencas ‘vendi’, aŭ prefere, la aliulon eventuale intencas ‘aceti’?
- ĉu vi estas preta respondi precize, sen nervoziĝi <sup>\*</sup>, al ĉiuj ankaŭ malicaj demandoj?

<sup>\*</sup> *via nervoziĝo montras klare, ke vi ne alfrontas kiel vi devus, vian taskon.*

- konu bone vian konkurencon, ne nur rekta, sed ankaŭ nereкта <sup>\*</sup>.

<sup>\*</sup> *rekta konkurenco estas, se vi volas la angla, kvankam tio ne veras; plej danĝera estas la nereкта konkurenco: nome manko de intereso pri kulturaj aferoj, pri lingvoproblemo, pri profunda interkonatiĝo de la popoloj.*

- montru aŭ pruvu, tion, pri kio vi asertas.

## 3. Kiam kaj kiel kontakti la klientojn?

- havu vian planon, kaj por ŝpari tempon, kaj por ne forĵeti viajn energiojn (monon)
- estu disponebla laŭ la volo de la kliento, ne laŭ via volo aŭ oportuneco.
- la unua impresio estas la plej grava: evitu kaj aplombon, kaj malvarmon, kaj tro konfidencan sintenon.

- alfrontu la temon laŭ la vidpunkto de la 'kliento', ne laŭ la via.
- prezentu la avantaĝojn por li, ne la malavantaĝojn de la konkurenco.

#### 4. Kiel alfronti la reagojn de la 'kliento'

- aŭskultu lian argumentadon pacience, kapjesante.
- kaptu la pozitivajn vortojn, eĉ se ĝenerale lia reago estas negativa.
- se iu demando estas klare malica, respondu per alia demando.
- se vi rimarkas, ke li ne reagas, stimulu lin per demandetoj.

#### 5. Pri la budoj kaj agotagoj

- se eblas, elektu lokon facile atingeblan, malproksime de budoj tro imponaj aŭ, male, tro izolitaj kaj ne interesaj.
- ekspluatu la sidejon de via urbo (se entute ĝi ekzistas) por organizi foje koktajlon, invitante interesatajn homojn pri iu specifa temo (instruistoj, lingvemuloj, ktp) kaj nepre ĵurnaliston de loka gazeto, kiun antaŭe aŭ poste vi regalos per tag- aŭ vespermanĝo en restoracio por trankvile interparoli. Prefere, tiam ĉeestu iu eksterlandano, prefere kiu venas de malproksime, aŭ estu konata persono, aŭ interesa (verkisto, astronomo, ktp). Evitu la politikistoj: tiuj kutimas altiri la atenton sur sin mem, ne sur via propono.
- sendu inviton personan al via manifestacio; havu por ĉiuj etan omaĝon (sufiĉas bele farita vizitkarto, kiu priskribu E-on kaj E-ion).
- ne forgesu informi la lokan gazetaron
- por altiri vizitantojn, ĉe via budo estu nepre simpatiaj homoj (ne gravas ĉu allogaj virinoj); prefere gejunuloj gajaj kaj optimismaj
- lasu la vizitanton momente trankvile trarigardi, sed tuj alfronti lin; ne ĝenu lin.
- se eblas, havu seĝojn kaj tableton, por sidigi la interesatojn.
- preparu kaj disdonu flugfolion, kiun oni ne forjetu.
- kaj, kial ne, havu ĉe la budo botelon da vino kun esperanta etikedo.

## 6. Kion fari poste?

- konservu kaj katalogu la nomojn de la kontaktitaj personoj: gravas datumoj kiel aĝo, profesio, hobiaj.
- por tion akiri, prefere disdonu enketilojn kaj invitu la vizitantojn pleniĝi ilin.
- la enketiloj devas tamen esti bone pristudataj kaj ne banalaj (prefere petu helpon ĉe profesiulo pri merkato-enketo).
- kontaktu la homojn, kiuj montris iun intereson eventuale sendante al ili broŝureton pri Eo kaj E-io, aŭ invitante ilin renkonti vin ĉe via sidejo.

## 7. Kion sendi?

- ĉiun informon, kiun vi sendas, havu respondkuponon, tiel ke la leganto povu peti pliajn informojn.
- la informilo estu klara, legebla, simpla.
- la enhavu sekvu la regulojn de bona informado (v. staĝo en Lucerno)
- se temas pri broŝureto, ĝi stimulu la atenton per demandoj (levi la problemon) kaj nur interne donu la solvon. Nepre evitu la vortojn 'esperanto' aŭ 'helplingvo' en la prezento (la vorton 'helplingvo' mi evitus entute).
- la linvaĵo estu rekta kiel vi parolus kun la leganto, kaj ĉefe, metu vin en la vestojn de la leganto mem, kiu cetere havas en siaj manoj, ion, kio 'ne interesas lin' kaj kion li ne petis.
- pretigu (por disdoni nur poste) iun tiel diritan 'produkto slipo', nome sinteza, sed kompleta prezento de la produkto esperanto, laŭ la moderna vidpunkto de ĝi, nome ne kiel helplingvo, sed kiel alternativa kulturlingvo.

## 8. Fideligo de la kliento.

- hodiaŭ oni tendencas 'ligi' al si la klienton pere de donacoj aŭ specialaj ofertoj.
- librovendejoj fondas etan klubon por diskuti, prezenti librojn ktp: kion similaj povus fari E-klubo?
- klubo ne nepre estu nur por instrui aŭ paroli pri E-o; la ekz. de KTP en Liono taŭgas: tie oni pritraktas 'lingvojn' ĉefe minoritatajn, kaj tie funkcias trinkejo...



## 9. Publikaj rilatoj

- publikrilati en via kvartalo, organizante ludojn, konkursojn por infanoj, por triaĝuloj, ktp.
- flegu la kontaktojn kun la lokaj gazetoj; se via urbo estas tro granda, trovu kvartalan ĵurnalon.
- sendu ĉiam gazetarkomunikon por viaj agadoj, kursoj, vizitoj de fremduloj, ktp. Tio kostas nenion, sed foje efikas.

## 10. La gazetarkomuniko

- ĝi povas esti nun informa aŭ komunika.
- ĝi estu ĉiuokaze mallonga
- se temas pri informo, diru sinteze: kio, kie, kiam.
- se temas pri informo, verku ĝin ĵurnalisto.
- ne forgesu kalkuli pri la tempoj necesaj por la aperigo de la komuniko (ne sendu tro malfrue, sed ankaŭ ne tro frue).
- se temas pri raporto pri iu okazaĵo, kaj se neniuj ĵurnalisto ĉeestis, verku ĝin laŭ la vidpunkto de la leganto: tio, kio interesas, kaj impresas vin, povas tute ne interesi la leganton. Antaŭ ol sendi ĝin legigu al iu, kiu prefere ne estu engaĝita en via afero.

### *Kelkaj negativaj reagoj kaj viaj eblaj respondoj*

- interesa, sed neniuj parolas ĝin

*R: estas kiel kompari multnacia entreprenon kun malgranda: la dua certe estas pli dinamika, pli disponebla solvi viajn problemojn.*

- jam ekzistas la angla, mi ne bezonas ĝin

*R1: ĉu vi povas identiĝi kun la angla lingvo?*

*R2: se ve renkontas samlandanon en Zurigo certe vi ne konsideras in; se lin vi renkontas en fora lando eble vi amikiĝas; same, se vi parolas angle kun svedo, vi simple interkomunikas; se kun li vi parolas esperante, vi povas amikiĝi.*

*R3: ĉu vi povas elteni diskuton samnivelan en la angla kun anglo aŭ usonano?*

*R4: ankaŭ mi scipovas, kaj ofte uzas la anglan: sed tio, kion mi proponas estas tute alia afero.*

- tio ne interesas min

*R1: ĝuste por klarigi al mi la ideojn, kio ne konvinkas vin?*

Ofte la tiel dirita febla punkto, ne estas tiom klara, eĉ al via alparolato.

## La svisa junularo apenaŭ konas esperanton

La svisa junularo apenaŭ konas esperanton. Tio estas la ĉefa konkludo el la surstrata enketado kadre de la agotagoj 1998 en Svislando. Tio fariĝas la defio al la svisa movado antaŭ la nova jarcento.

La laborgrupo pri varbado el-laboris koncepton pri surstrata enketado fare de lokaj grupoj, simile al la norvega enketado 1995, sed limigita kaj simpligita, sen alstrebi profesian nivelon. La laborgrupo traktas varbajn taskojn nome de la Estraro.

Libervole partoprenis la grupoj de Basel, Bern, Genève, Lausanne, Luzern kaj Wil / St. Gallen. Entute surpriza kaj miriga kunlaboro, kio signifas, ke lokaj grupoj ekagas, se ekzistas difinitaj celo kaj konceptoj. Menciindas, ke la enketo vigligis la grupan vivon.

Ni pridemandis entute 700 personojn, samproporcie virojn kaj inojn. Po 100 por urbo, trione junulojn ĝis 30 jaroj, trione mezaĝulojn inter 30 kaj 60 jaroj, kaj trione pliaĝulojn ekde 60 jaroj. La enketistoj mem taksis la aĝon. Enketis esperantistoj kaj ne-esperantistoj, junuloj alparolis junulojn.

Unua demando : Kio estas esperanto ? 83 % de la junuloj, 48% de

la mezaĝuloj kaj 45% de la pliaĝuloj ne scias, kio estas esperanto. Aŭ pozitive dirite, 17% de la junuloj, 52% de la mezaĝuloj kaj 55% de la pliaĝuloj scias, ke esperanto estas lingvo. Multaj miris, ke ĝi ankoraŭ vivas kaj deziris scii pli.

Dua demando : Ĉu vi favoras al esperanto ? Devis respondi nur enketatoj, kiuj scias pri esperanto, nome 193 personoj. El tiuj 129 jesis, 64 neis, do averaĝe du trionoj favoras al esperanto, unu triono ne. Oni kredas, ke la angla funkcias kiel internacia lingvo kaj ke esperanto ne disvastiĝis. Tiuj elcentoj estas pli malpli samaj ĉe junuloj, mezaĝuloj kaj pliaĝuloj.

La enketado estis informiĝo, malpli varbado. Interesatoj tamen laŭdezire ricevis informojn. La rezultoj klare montras, kio estas plej necesa : informadi pli, ĉar nur tiuj, kiuj scias pri esperanto, povas interesiĝi.

La prezidanto : Bruno Graf

### Redaktaj limdatoj

Por **SES informas 1999-2** (aprilo + majo) la redakta limdato estos la 20an de marto.

Por **SES informas 1999-3** (junio + julio + aŭgusto) : 20an de majo.

Por **SES informas 1999-4** (septembro + oktobro) : 20an de aŭgusto.

# Indekso enhava de *SES informas* Jaro 1998

## Enkondukaj vortoj :

Por favori retrovon de artikoloj kaj informoj aperintaj en nia organo jen ni publikigas indeksojn de la pasinta jaro. Ni intencas same indeksi la antaŭajn jarkolektojn de *SES informas* kaj poste tiujn de ties antaŭuloj *Svisa Esperanto-Revuo* kaj *Svisa Esperanto*. Tiu laboro certe akcelos la esplorojn pri la disvolviĝo de esperanto en Svislando.

Ni atendas helpon forme de drasta kritiko de tiu ĉi unua indekso, por povi ĝin korekti kaj por alporti al nia pionira laboro la dezirindajn plibonigojn.

Claude Gacond

## Mallongigoj :

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

e-o = esperanto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonomo de

vd = vidu

## Signifo de la krampoj :

« Titolo de libro aŭ periodaĵo »

‘Nomo de agado aŭ renkontiĝo’.

## A

‘Agado 2003’ : n1 p4, n3 p5, n4 p3, n5 p2.

‘Ago-Tago’ : n4 p2, 9, n5 p7.

Alejchem Shalom : n5 p12.

« Altstadt Kurier » : n4 p4.

Altherr Anita : n2 p3, n3 p7, n4 p14, n5 p12.

Amouroux Jean : n4 p14.

Arax Ani : ps Stakian Ardachès : n3 p19.

Argus : n1 p3, n2 p1, 2, n4 p3.

Ari vd Martinelli aŭ Silber.

‘ Artikoloj pri eo ’ : n1 p3, n2 p1, 2, n4 p3.

Auld William : n4 p6, n5 p2.

« Aventuroj de pioniro » : n3 p14, n5 p16.

## B

« Babylonia » : n4 p2.

Badoux Françoise : n1 p4, n5 p2.

Baghy Julio : n5 p11.

Balkanyi Paŭlo : n5 p11.

Banet-Fornalowa Zofia : n5 p13.

Barberis Ester : n3 p7.

Baur Arthur : n1 p8, n3 p6, 15, n4 p15, 16, n5 p2.

Beau Rolf : n5 p20.

‘Belartaj Konkursoj’ : n5 p19.

Bélisle Mario : n3 p17.

Bélisle Marion : n1 p2, n3 p17, n4 p11.

Bélisle Romain : n3 p17.

Béroud-Focke Nicole : n1 p2, n3 p1, 4, n4 p13.

Beretta Nicoletta : n3 p7.

Bertolini Dante : n4 p1, 6, n5 p2.

Berva Sandra : n1 p4.

Béatrix-Koleva Rémy : n5 p8.  
Béatrix-Koleva Sylvie : n5 p8.  
Béatrix-Koleva Sonja : n1 p6, n5 p8.  
Bickel Andres : n1 p7, n3 p13.  
Bickel Camille : n1 p7, n3 p13.  
Bipp Hans : n3 p6.  
Bishop Brian R. : n4 p15.  
Blanc Claude : n5 p2.  
« Blick » : n4 p5.  
« La Bona Lingvo » : n5 p19.  
Borel Jean : n4 p14.  
Bormann Thomas : n5 p1.  
Botta Mario : n3 p3.  
Bovet-Luthi Jean : n3 p18.  
Bovet-Luthi Mathilde : n3 p18.  
Brügger Franz : n3 p7.  
« Brasikfolio » : n1 p7, n3 p19.  
Brun Sonja : n1 p2, n3 p7, 20, n4 p2, 14, n5 p2, 15.  
Buczynska Anna : n5 p13.  
Buhlmann David : n1 p3, 4, n3 p2, n4 p1, n5 p2, 8, 11, 14.  
Bulgara Eo-Teatro = BET : n5 p13.  
« Der Bund » : n4 p6.

### C

Caraco Jean-Claude : n1 p5, n4 p15.  
Carlevaro Tazio : n4 p2, 4, 10, n5 p3, 5, 16.  
Cathomas-BearthRita : n5 p1.  
« Il Cattino » : n4 p3.  
« Centjara asocia eo-movado en Francio : 1898-1998 » : n4 p14.  
Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo I-a = CDELI : n1 p1, 5, 7, 8, n2 p1, 4, n3 p1, 13, 14, 15, 16, 17, 19, 20,

n4 p1, 2, 3, 5, 6, 7, 10, n5 p1, 3, 5.  
Cherpillod André : n1 p2.  
Chmielik Tomasz : n1 p5, n5 p12, 13, 14.  
« Construire » : n4 p4.  
Cork-Levet Françoise : n4 p3.  
« Corriere del Ticino » : n4 p4.  
Corsetti Renato : n3 p13, n5 p15.  
Cotton Armand : n3 p14.  
Czechowicz Jozef : n5 p13.  
Cotton Yvonne : n3 p13, 14.

### Ĉ

« Ĉu li venis trakosme ? » : n5 p2.

### D

« La Danĝera Lingvo » : n5 p2.  
Darbellay Christian : n3 p13.  
Darbellay Sabine : n3 p13.  
De Beaufront Louis : n4 p14.  
« Le Défi des langues » : n5 p19.  
De Reynold Gonzague : n 4 p10.  
De Sassi Moritz aŭ Maŭro : n3 p6.  
De Saussure René : n4 p15.  
Dettling Annelis : n3 16.  
Dohrn Verena : n5 p13.  
Dorthe Pierre : n4 p3.  
Dovat Lucienne : n3 p7, n4 p5.  
Drewitz Nina : n3 p1.  
Dubois Hans ps Carlevaro Tazio : n4 p10.

### E

Eggenberger Gertrud : n1 p6, n4 p14, n5 p10.  
'Ekspozicioj' : n1 p6, n3 p2.  
« El la Verda Biblio » : n5 p13.  
Elbaz Dorothea : n4 p10.  
ELTE-Universitato : n5 p6.  
« Enciklopedio de la svisaj planlingvaj movadoj » : n4 p15.

« Enkonduka kurso » : n1 p2.  
Ernst Rolf : n4 p6.  
« L'Espérantiste » : n4 p14.  
« E-o » : n4 p3, n5 p19.  
« E-o-Dokumentoj » : n5 p19.  
'E-o-ekzamenoj' : 1 p3, 6, 5 p6.  
« E-o für Globetrotter » : n5 p7.

### **E-o-organizajoj lokaj :**

- **Esperanto-Societo Basel** =  
ESB : n1 p2, 6, n3 p1, 3,4, 14, n4  
p12, n5 p6.  
- La Chaux-de-Fonds : n1 p7, n4  
p13, n5 p8.  
- **Esperanto-Grupo « La Stelo »**  
= EGS, Genève : n1 p.2, 5, 6, 7,  
n2 p4, n3 p7, 15, n4 p13, n5 p7.  
- **Laŭzana Esperanto-Societo** =  
LES, Lausanne : n1 p2, 5, 6, 7,  
n2 p4, n3 p7, 15, n4 p5, 13, n5  
p7, 11.  
- **Lucerna Esperanto-Societo** =  
LES, Luzern : n1 p2, 6, 8, n3 p5,  
15, n4 p13, n5 p7, 8.  
- **Esperanto-Societo Neuchâtel** =  
ESN : n1 p7, n5 p8.  
- **Esperanto-Klubo Wil** = EKW :  
n1 p2, 8, n2 p3, n3 p16, n4 p13,  
n5 p10.  
- **Esperanto-Societo Zürich** =  
ESZ : n1 p2, 8, n3 p5, 16, n4  
p14, n5 p10.  
E-o-Pen-Centro aŭ Pen-Club : n1  
p6, n4 p2, 4.  
« L'Essor » : n4 p4.  
Etter Philipp : n4 p10.  
« Eventoj » : n4 p3.  
Expo 2001 : n3 p7, n4 p2.  
« L'Express » : n4 p6.

### **F**

Felszeghy Judit : n5 p6.  
« La Fenomeno E-o » : n5 p2.  
« Fenomeno Svislando » : n1 p8.  
« Festlibro por la 50a naskiĝ-tago  
de Reinhard Haupenthal » : n4  
p15.  
Fettes Mark : n3 p13.  
Fiechter Annelies : n3 p3.  
Filali Renata : n5 p2.  
Fink Fritz : n5 p20.  
Fink Yvette : n4 p4.  
Fontannaz Nancy : n1 p4.  
Forge Jean : n5 p11.  
Fornal Jerzy : n5 p13.  
'Forumo por la Ea Civito' : n4 p2.  
« Franca E-isto » : n4 p14.  
Füssli Orel : n4 p10.

### **G**

Gacond Andrée : n1 p5, n3 p14,  
n5 p8.  
Gacond Claude : n1 p1, 2, 5, 7, 8,  
n2 p1, n3 p1, 4, 6, 8, 14, 15, 18,  
19, 20, n4 p1, 4, 5, 7, 13, 16, n5  
p1, 5, 8, 11, 19.  
Gacond Gabrielle : n1 p7.  
Gasser Wolfgang : n3 p7.  
Gataud Paule : n3 p20.  
'Gazetara (aŭ Informa Servo)' : n1  
p3, n3 p5, 6.  
Germana E-o-Asocio = GEA : n1  
p3, n3 p2.  
« Gerda malaperis » : n3 p2.  
Gessler Claudia : n1 p.3, n3 p2.  
Glättli Ernst : n1 p3, n3 p2, 4.  
Gonin Hervé : n4 p14.  
« Gonzague de Reynold : ideo-  
logue d'une Suisse autoritaire » :  
n4 p10.

Graf Bruno : n1 p1, 2, 3, 8, n2 p3,  
n3 p1, 4, 5, 6, 7, 14, n4 p1, 2, 4,  
5, 6, 7, 8, 9, 10, n5 p1, 3.

« Granda Vortaro E-a-Germana » : n5 p20.

Graneroli Moreno : n3 p7.

Grosjean Mireille : n3 p7, 17, n4  
p1, 2, 3, 6, 7, 12, n5 p4, 5.

Grosjean Yvon : n3 p17.

Giannini Walter : n5 p2.

« Guinness-rekordlibro » : n1 p8.

### Ĝ

« La Ĝoja Podio » : n3 p14.

### H

Hauger Rudiger : n4 p12.

Hauptenthal Reinhard : n4 p15, 16.

« Heroldo de E-o » : n1 p2, 3, n3  
p3, 5, n4 p1, 2, 3.

Hodler Hector : n3 p5, n4 p3, 14.

Homaj rajtoj : n1 p4, 5, n2 p4, n3  
p6.

### I

« Idala Foliumi » : n4 p10.

Ido : n4 p10.

I-a Federacio de E-istaj Fervoj-  
istoj = IFEF : n4 p14.

I-a Ligo de E-istaj Instruistoj =  
ILEI : n4 p3, 11, 12, n5 p4.

« L'Impartial » : n4 p6.

'I-a Fervojista Eo-Skismajno en  
Maribor' : n2 p3.

'Ia Literatura-Forumo' : n5 p12,  
13, 14.

'I-a TEJO-seminario' : n3 p2.

Interreto aŭ Interneto : n1 p8, n3  
p5, 16, n4 p4, 11, n5 p3.

I-a Scienca Asocio E-ista : n4  
p12.

### J

Jacob Hans : n4 p14.

Jelmini Chantal : n3 p7.

Junularo E-a Svislanda = JES : n1  
p1, 2, 3, n3 p2, 4, 6, 7, n4 p8, 9,  
11.

Jobin-Nowak Mariola : n5 p9, 10.

Jobin-Nowak Edgar : n5 p9, 10.

Jobin-Nowak Silvio : n5 p9.

Jobin-Nowak Varinka : n5 p9.

Joguin Jacques : n4 p12.

Jufer Susi : n3 p1.

« Junaĝa Verkaro » : n5 p16.

Juste Andreas : n4 p10.

### K

Kabe : n5 p11.

Kalinowski Zenon : n5 p20.

Kalocsay Kálman : n5 p 11.

'Kampanjo 2000' : n1 p2, n3 p5.

Kooperativo de « Literatura Foi-  
ro » = LF-koop : n1 p2, 6, n4 p1,  
2, n5 p12, 14.

Kultura Centre E-ista = KCE : n1  
p3, 5, n3 p2, 17, n4 p7, n5 p6.

Kerckhoffs Auguste : n4 p15.

Kessler Alice : n4 p3.

Koleva : vd Béatrix-Koleva.

Koller Alois : n3 p7.

« Komentoj » : n5 p3.

Korczak Janusz : n5 p13.

Krause Erich-Dieter : n5 p20.

« KREDU min sinjorino ! » : n1 p7,  
n3 p14.

Kreis-Schneeberger Clara : n4  
p16.

Kuchen Ida : n3 p7.

Künzli Andreas E. aŭ Andy : n1  
p2, 4, 5, n2 p4, n3 p13, 14, 15,  
n4 p15, n5 p8, 14, 15.

« Kuriero de E-o » : n3 p3.

'Kultura Konsilio' : n1 p 6.  
Kuwálek Robert : n5 p12.  
(La) Kvinpetalo : n5 p19.

### L

La Torre Maŭro : n4 p12.  
Lavanchy Jean-Jacques : n1 p4.  
'Labor-grupo por varbado' :  
Laederach Werner : n4 p16, n5  
p2.  
Laszay Anna aŭ Anjo Amika : n5  
p6.  
Leburgue Marie-Claude : n4 p4,  
5.  
Lee Chong-Yeong : n1 p4, 7, n2  
p4, n3 p13.  
Lejzeroviĉ : n5 p13.  
Liechti Fritz : n4 p16, n5 p2.  
Liechti Hanny : n4 p16.  
Ligo de Nacioj =LdN : n4 p10.  
« Lingvo » : n1 p2.  
Linkowski Grzegorz : n5 p13.  
Lins Ulrich : n5 p2.  
LF-koop vd Kooperativo de « Li-  
teratura Foiro ».  
« Literatura Mondo » : n3 p8, n4  
p7, n5 p11.  
Literatura Servo « Espero » : n5  
p20.  
LF-koop : n1 p2, 6, n4 p1, 2, n5  
p12, 14.  
Loderer Benedikt : n4 p4.  
Lüdi : n5 p4.  
Luthi Frédéric : 3 p18.  
Luthi Mathilde Antoinette (aŭ  
Miky) : n3 p6, 17, 18, 20, n5  
p20.

### M

Maitzen Hans-Michael : n3 p13.  
Majra : n5 p10.

Mamin Jeanne : n4 p3.  
Margot Nicole : n1 p2, 5, n3 p2, 4,  
n3 p9, 10, 14, n4 p2, 7, n5 p5, 7.  
Martinelli Perla : n1 p2, n3 p4, n5  
p2, 14.  
Mattioli Aram : n4 p10.  
« Mazi en Gondolando » : n1 p 6,  
n5 p7.  
Mellini Angelo : n1 p2, 8, n3 p4,  
5, 7, n5 p2.  
« Menade bal pŭki bal » : n4 p15.  
'Merkatika tago' : n3 p7, n4 p8,  
n5 p3.  
Merz Gertrud : n1 p4, n4 p3.  
'Metodika kunveno' : n1 p2.  
« Metodiko de la E-o-Instru-  
ado » : n5 p1.  
Mevo Mad ps Stakian-Vuille  
Madeleine : n3 p19.  
Molnár Monika : n1 p5.  
Monachon Samuel : n1 p7.  
« Monato » : n4 p14.  
Montessori Maria : n3 18.  
« Monumente pri Esperanto » : n5  
p1.  
Motta Giuseppe : n4 p10.  
Movado (aŭ Institution) JEAN :  
n3 p17, n5 p20.  
Münger Marie-Louise aŭ Mari-  
lou : n3 p17, 20, n5 p20.  
Muzy Jean-Marie : n4 p10.  
Muzeo Tinguely (Basel) : n3 p3.

### N

Naville Ernest : n4 p14.  
Nemere István : n1 p6, n5 p13.  
« Neue Luzerner Zeitung » : n4  
p4.  
Niesert Ursula : n1 p3, n3 p2.

Norvega Esperantista Ligo =  
NEL : n4 p9.  
« Nova Bulteno de ISAE » : n4  
p12.  
« Nova E-a Krestomatio » : n5 p2.  
Nowak : vd Jobin-Nowak.

### O

« Oberländisches Volksblatt » : n4  
p15.  
Oeschger Liselotte : n3 p3.

### P

« Pasporta Servo » : n4 p11.  
« Patreco » : n5 p8.  
Pereira de Souza José Odilon : n3  
p20.  
Perez Jickak Leib : 5 p12.  
Picasso Marco : n4 p7, 8, 9, n5 p3,  
6.  
Pilet-Golaz Marcel : n4 p10.  
Piron Claude : n1 p3, n3 p3, 14,  
n4 p4, 15, n5 p5, 19.  
Pochanke Barbara : n1 p2, n2 p3,  
n3 p4, 7, n4 p3, 16, n5 p2.  
Pochanke Dawid : n3 p2, 7.  
Pochanke Stanislaw. : n1 p8, n2  
p3, n3 p6, 16, n4 p2, 13, 14.  
Pochanke Vera : n3 p2.  
'Premio Degučı' : n5 p19.  
Privat Edmond : n3 p5, 14, n4 p3,  
15, n5 p16-19.  
Pro Helvetia : n5 p1.  
Pytloun Slava Vojslav : n3 p6, n4  
p16.

### Q

Quaglia Alice : n3 p 7.

### R

Rakuša Rudolf : n5 p1.  
Randin François : n1 p2, 3, 7, n3  
p2, 3, 5, 14, n4 p7, 11, n5 p4, 5.

Raymond Hélène : n5 p2.  
'Regiona Kultura Semajnfino' :  
n1 p2, n3 p7, 8-11, n4 p7, n5  
p10-12.  
Régulo Perez Juan : n5 p16.  
'Renkontiĝo SES-UEA' : n1 p5,  
n3 p6.  
'Rendevuo de aktivuloj' : n1 p3,  
n5 p3.  
Rentsch Patrick : n1 p2.  
Reutemann Lina : n4 p16.  
Rey-Zollinger Konrad : n5 p2, 6.  
Richard Yvonne : n5 p20.  
Rieser Willy : n5 p2.  
'Rika Metodo' : n3 p17.  
Röllinger Hugo : n5 p1.  
Rohrbach Marc : n3 p17, 20.  
Rooke Dieter : n3 p7, 20, n4 p5,  
n5 p2.  
Rossetti Cezaro : n1 p7, n3 p14.  
Rossetti Reto : n5 p16.  
Rüegg Paul : n3 p7.

### S

Svisa Asocio de E-o Fervojistoj =  
SAEF : n1 p3, 6, n3 p1, 2.  
Sandmeier Heinz : n3 p7.  
Sandoz-Giroud Cosette : n1 p5, n3  
p14.  
Schaerer Lilly : n5 p2.  
Scherer Paul : n3 p6, n5 p8.  
Schleyer Martin : n4 p15.  
Schmid Doris : n1 p4.  
Schneebeli Rudolf : n3 p7.  
Schneeberger Friedrich : n4 p16.  
Schwartz Raymond : n3 p15, n5  
p8, 11.  
Schwartz Teodoro : n5 p11.  
Schwarz Marcel : n3 p7.  
« Scienca Revuo » : n4 p12.



'Seminario aŭ simpozio UEA-UN' : n1 p5, n3 p12.

Senhauser L. : n1 p8.

**Svisa Esperanto-Societo = SES :**

- agadraporto : n1 p1-3, n3 p4.

- aktiveco : n1 p1-5.

- donacoj : n1 p4, n3 p7, n4 p3, n5 p2.

- celaro : n1 p2, n3 p5.

- centjara jubileo : n4 p3.

- dumvivaj membroj : n5 p2.

- enketoj : n1 p2, n5 p8.

- 'Ĝenerala Jarkunveno' : n1 p1-3, n3 p2, 4-7, n3 p4-7, n5 p3

- honoraj membroj : n3 p18, n4 p16, n5 p2.

- interreto : n1 p8, n3 p5.

- kotizoj : n1 p4, n4 p8.

- kunlaboro : n2 p4.

- kunvenoj : n1 p2.

- labor-grupo por varbado : n1 p2, n3 p4.

- prospektoj aŭ varbiloj : n1 p2, n3 p6, n5 p7.

- reprezentado : n1 p6.

- statuto : n1 p1, n4 p2.

- subvencioj : n1 p3.

Sformim Mendele Mojcher : n5 p12.

Silfer Giorgio : n4 p7, n5 p6, 14.

Singer Isaac Bashevis : n5 p12.

Skorupski Stanislaw : n1 p8, n3 p16, n4 p4.

Société pour la Propagation de l'Espéranto : n4 p14.

Sprenger Jakob : n4 p15.

« Spure » : n4 p6.

Stakian Ardachès : n3 p6, 18, 19, n4 p16.

Stakian-Vuille Madeleine : n3 p4, 19, n5 p2, 7.

Stakian Megrditch Efendi : n3 p19.

Steinauer Jean : n4 p10.

Streit Suzanne : n3 p7.

« Svisa E-o-Societo informas » : n1 p3 n3 p5, 6, n4 p2.

« Svisa Espero » : n5 p19.

« Svisa Fervoĵisto » : 1 p6.

Svisa ILEI-sekcio : n1 p6, n4 p11, n5 p4, 5.

Svisa Radio Internacia : n3 p15, n4 15.

Svisa Unesko-Komisiono : n5 p1.

Szabó Tamás : n5 p6.

Szilagyi Ferenc : n5 p11.

## T

« Tages-Anzeiger » : n4 p4.

'Tago X' : n3 p7.

Tutmonda E-ista Junnulara Organizo = TEJO : n1 p1, n3 p2, 6, n4 p11.

« Tempo » : n3 p16, n4 p4.

Tinguely Jean : n3 p3.

« Trezoro : La E-a Novelarto 1887-1986 » : n5 p16.

Trifončovski Ljubomir : n5 p14.

'Trilanda renkontiĝo' : n1 p3, n3 p1-4.

## U

Universala E-o-Asocio = UEA : n1 p4, 5, 7, n2 p4, n3 p7, 12, 17, 20, n4 p1, 3, n5 8, 14, 19.

Unuiĝinta Naciaro = UN : n1 p4, 5, 7, n2 p4, 12, n5 p14, 19.

Unuigita Franca por E-o = UFE : n4 p14.

« Universala deklaro de homaj rajtoj » : n1 p4, n2 p4, n3 p6.

Universala Kongreso de E-o = UK : n3 p15, 20, n4 p1, 3, 12, 14, n5 p15, 19.

## V

Valano Johán ps Piron Claude : n5 p2.

Vasserot Jaqueline : n4 p5.

Vatré Henri : n4 p15, 16, n5 p16.

Veith Amalie : n3 p7.

Vessella Nino : n5 p15.

Vischer Eva : n1 p7, n3 p6.

Vitali Daniele : n1 p6.

Viviani : n5 p1.

« Vocabolario Eo-Italiano, Italiano-Esperanto » : n5 p15.

Volapük : n4 p15.

Von Büren Jean-Thierry : n3 p4, n4 p7, n5 p5.

Von May Ernst : n1 p2, 4, n3 p4, 6, 7.

## W

Walder Elsbeth : n3 p7.

Weidmann Armin : n1 p4.

Weidmann Dietrich M. : n1 p8, n3 p16, 20, n4 p2, n5 p3.

Weil Gisèle : n3 p7.

Weinhengst Hans : n5 p11.

Wettstein Henri : n5 p2.

Wolf Mathilde : n5 p8.

## Z

Zamenhof Leizer L. : n5 p1, 13, 14.

« Zwischen Demokratie und totalitärer Diktatur: Gonzague de Reynold und die Tradition der autoritären Rechten in der Schweiz » : n4 p10.

# Mortoj

Dum la pasinta duonjaro nia svisa movado malriĉiĝis je tri gravaj personecoj, po unu en Alemanio, Tiĉino kaj Romandio. La ĉi-sekvaj nekrologoj respoguluan profundan tristecon pro ilia forpaso, nian simpatian al iliaj familioj kaj nian fieron pro iliaj originalaj kontribuoj por-esperantaj. Raporti pri ilia vivo kaj iliaj aktivecoj, estas iel esprimi, ke tiuj samideanoj restas spirite vivantaj inter ni pro sia kontribuo al la esperanta poezio originala kaj traduka.

## Mirko Mamuziĉ

aŭ

## Emmerich Manner

9 aŭgusto 1928 - 31 aŭgusto 1998

Mirko Mamuziĉ naskiĝis la 9an de aŭgusto 1928 en Apatin (Vojvodina, Kroatio), kie li vizitis la elementan lernejon. La gimnazion li frekventis en Sombor. Lia gepatra lingvo estis ne la kroata, sed la hungara.

En 1955 li diplomiĝis en la Teknika Fakultato de la Zagreba Universitato fariĝante maŝinfaka inĝeniero. Sian karieron li komencis en zagreba entrepreno,

kie li elstaris kiel projektanto de elektraĵ centraloj.

En 1967 li rifuĝis Svislanden, instaligante en Nussbaumen kaj dum 26 jaroj li laboris kiel inĝeniero-projektanto en la svisa firmao Motor Columbus, kie li okupiĝis pri projektado de elektraĵ kaj nukleaj centraloj. Li emeritiĝis el tiu aktiveco en 1993. Ok jarojn antaŭe, kiam en 1985 li akiris la svisan civitanecon, li ŝanĝigis sian nomon al Emmerich Manner. El tio fontas la duobleco de liaj nomoj.

Mirko Mamuziĉ esperantiĝis en 1947. Tuj li fariĝis aktiva en Kroata Eesperanto-Ligo kiel komitatano, preleganto kaj kursgvidanto. Apartan intereson li ĉiam dediĉis al gramatikaj demandoj kaj lia verko *Kompedio de Esperanta Gramatiko*, kies specimeno konsulteblas en CDELI, montriĝas tre utila helpilo por ĉiuj, kiuj emas enprofundiĝi en la studo de nia lingvo.

Mirko Mamuziĉ plenumis signifan rolon en la esperanta fako de Radio Zagreb kiel lerta tradukisto kaj ŝatata parolisto. Sed sian tradukan talenton li ĉefe dediĉis al la esperantigo de poemoj, interalie de poemaro de Boro Pavloviĉ. En Svislando li daŭrigis sian por-esperantan aktivecon antaŭ ĉio kadre de la zurika grupo prelegante pri gramatikaj, movad-historiaj kaj beletraĵ temoj kaj

raportante pri siaj vojaĝoj per la prezento de belaj lumbildoj. Kadre de SES li prezidis la Ekzamnenan Komisionon. Sub lia gvido disvolviĝis ekzamenaj scioj en Baden, Bern kaj Zürich.

Li ne ĉesis traduki el la kroata kaj liaj esperantigoj legeblas en la verkoj *Kroata poezio* kaj *Antologio de kroataj unuaktaj dramoj*.

Sian hejman libraron li riĉigis ĝis la fino de sia vivo per novaj esperantaĵoj. Fakte ĝuste kelkajn semajnojn antaŭ sia subita morto li ankoraŭ aĉetis dekon da libroj en la Universala Kongreso en Montpellier. Kun sia edzino, kiu ankaŭ estas esperantlingva, li vizitis plurajn Universalajn Kongresojn, inter kiuj la aŭstralian, kaj ĉiam li aktive partoprenis en iliaj laborkunsidoj.

Ni ne forgesu mencii lian poliglotecon. Flue li uzis dekon da lingvoj eŭropaj kaj ekstereŭropaj. Lia amiko Ivo Borovečki, kiu korespondadis kun li dum pluraj jaroj pri diversaj lingvoj, ĉiam admiris lian zorgemon al lingva perfekteco, tio ĉi ne nur en esperanto. Ekzemple pasie Mirko klarigis al li la karakterizaĵojn de la lingvoj turka kaj afrikansa.

Sed ne nur lingvoscienco interesis lin, ankaŭ pri la literaturo de la studataj lingvoj li ŝatis intimiĝi. Kaj pri historio kaj antropologio li multon sciis.

Muzikema kaj fotema li ankaŭ estis. Tion pruvas lia riĉa kolekto da diskoj, sonkasedoj, videobendoj kaj liaj kvardek mil diapozitivaj.

Kiel la zagrebaj esperantistoj, kiuj lin dece adiaŭis dum funebra ceremonio en Zagreb, ankaŭ nome de Svislando ni esprimas sinceran kondolencon al lia estimata edzino Mira. Ni malfacile imagas en kian doloregon ŝin ĵetis la subita forpaso ŝia edzo.

Claude Gacond

## Dante Bertolini

Maroggia 02.01.1911 – Locarno 15.11.1998

Dante Bertolini unuafoje aŭdis pri la kultura valoro de esperanto pere de kontakto kun Edmond Privat, kiam la biografo de Zamenhof kaj Mahatma Gandhi instruis la francan kaj anglan en Tiĉino. Tial, kiam post la morto de Privat la gimnaziano Tazio Carlevaro invitis min por prelegi en la franca en Bellinzona pri la vivo, la verkaro kaj la penso de la aŭtoro de la ĵus eldonita verko *Aventuroj de pioniro*, en la atentema publiko min avida aŭskultis la lerneja inspektoro Dante Bertolini. Ekde tiam komenciĝis niaj pripedagogiaj rilatoj.

Dante Bertolini senpacience atendadis sian profesion emeritiĝon por starti en la studado de

esperanto. Unuan okazon prezentis al li kurso, kiun organizis en lia urbo Locarno la Migros-lernejo. Ĝin gvidis Irene Molinari. Tre baldaŭ poste la eksinspektoro aliĝis al tutsemajna porinstruista esperanto-staĝo, kiun iniciatis la instru-departemento de la berna kantono. Mi estis ricevinta la taskon ĝin gvidi en la montara lernejo de La Combe du Pelu en la komunumo La Ferrière, kie ankoraŭ nun instruas la esperantisto Ulrich Moser. Admirante la jonkvilojn en plena florado ni meztage migradis por la tagmanĝo al la sufiĉe fora restoracieto 'La Puce' kaj Dante Bertolini entuziasme laŭdadis kaj la belegajn paŝtejojn ĵurasajn, kaj la zamenhofan belsonan idiomon kaj mian didaktikon, kiu malkovrigas al la lernantoj ekde la unua leciono perlojn prozajn kaj poeziajn el la esperanta beletro.

Lia posta publikigo de la poemaroj '*El la nova ĝardeno / Dal nuovo giardino*' (1979 kaj 1985) kaj '*In quest'era omicida / En ĉi murdepoko*' (1987) estas certe eĥoj el la studo de poemoj el la *Esperanta Antologio* komencita en La Combe du Pelu, same kiel lia eldono en 1987 de '*Avventure d'un pioniere*' konkludis tradukon de la libro *Aventuroj de pioniro* de Privat, kiu estis nia studlibro en tiu montara lernejo. Bertolini dediĉis al tiu ekitaligo siajn

vesperojn en hotela ĉambro en La Chaux-de-Fonds, kien mi ĉiutage veturigis lin rehejmigante en La Sagne.

Dum tiuj duonhoraj aŭtomobiladoj maturiĝis lia dua instru-kariero. Ekde tiam al infanoj kaj plenkreskuloj li entuziasme instruadis esperanton dum deko da jaroj en libervolaj kursoj. Tiu aktiveco kulminis en porinstruista konferenco en Locarno kaj per karavana vojaĝo al KCE kun aro da geknaboj flue parolantaj la zamenhofan lingvon. Fernanda Pisciani patrinece vartis tiujn junajn esperantistojn.

Dante Bertolini alvenis al la konvinko, ke esperanto en la elementa lernejo mirinde aktive helpas enprofundiĝi en la studado de la propra lingvo kaj tutcerte faciligas la ekstudon de la fremdaj lingvoj. Sed renkontante la dubemon de la kolegoj kaj de la instru-instancoj, kiel mi li fine komprenis, ke ne ankoraŭ alvenis la tempo anoncita de Ernest Naville kaj Pierre Bovet. La didaktike helpan rolon de esperanto la pedagogoj reale malkovros, nur kiam ili pretos emancipiĝi el aro da antaŭjuĝoj malfavoraj al reale scienca instruado de la lingvoj. La viktimoj de tiu lerneja konservatismo estas ne la instruistoj mem, sed tre bedaŭrinde la sendefendaj infanoj. Pro tia fuŝinstruado al multaj el ili la

reala alirol al fremda lingvo estos definitive blokita.

Sed same kiel mi, Dante Bertolini restis konvinkita, ke foje maturiĝos la didaktika rolo de esperanto, kiel alvenas ĉiujare la sezono de la jonkviloj en la ĵurasaj paŝtejoj. Sed rilate al la lingvo-instruado la sezonŝanĝoj estas ege malrapidaj. Ankoraŭ longe daŭros la vintro de senefika pedagogio tradiciema, vane suferiga kaj senkuraĝiga por la instruatoj.

Kun mi Dante Bertolini ankaŭ konstatis, ke la esperanto-movado mem ne pretas doni realan lokon al la junaj lernejoj esperantistoj, kiel cetere ĝi ne kapablas varti la gefilojn de la esperantistoj. La esperantistaro ŝatas plendi, ke la lernejoj ne interesiĝas pri esperanto, sed kiam pedagogoj lanĉas instru-eksperimentojn, la samaj plendantoj neniel sentas sin reale koncernataj de iliaj strebadoj. Tio estas kurioza sociologia sinteno ĝis nun malofte menciita kaj esplorata. Ĉiuj lingvo-minoritatoj zorgegas pri siaj idoj, krom la esperanta. Pri tiu kurioza sinteno ni havis plurfoje la okazon kune diskuti, kaj el tiuj trankvilaj debatoj Dante kaj mi mem alvenis al la konkludo, ke ankaŭ por esperanto la printempo ne ankoraŭ alvenis en esperantujo !

Dante Bertolini estis filo de italo kaj de svisino. Post la gimnazio li

frekventis lignajstan metilern-  
ejon, antaŭ ol eniri porinstruistan  
lernejon kaj poste eĉ sekvi dum  
du jaroj beletrajn kursojn ĉe Roma  
Universitato (1937-1938), stipen-  
diitajn de la tiĉina kanton. Tio  
estis tutcerte konsekvenco de la  
premio 'Schiller', kiun li ricevis  
en 1935 por sia unua poemaro  
'*Voci e bisbigli*'. En 1937 sekvis  
unua premio 'ex æquo' de la  
Societo de Svisaj Verkistoj por  
alia lia poemaro titolita '*Licheni*'.

Lian instru-karieron karakterizas  
du periodoj. Unue de 1931 ĝis  
1950 li oficis kiel instruisto en  
bazaj klasoj komence en la mont-  
aro kaj fine en Locarno. Kaj due  
de 1950 ĝis 1971 li deĵoris kiel  
lerneja inspektoro de la tiĉina  
kanton.

Ekde 1935 Dante Bertolini  
konatiĝis fare de la publiko unue  
kiel verkisto per siaj poemoj, kiuj  
aperis en tiĉinaj gazetoj kaj pli kaj  
pli vigle ankaŭ per siaj porlernejaj  
kaj pedagogiaj legolibroj, kiuj  
estis baldaŭ agnoskitaj kiel  
oficialaj instruiloj. Pri lia verkista  
sinteno mi donu la parolon al la  
tiĉinano Tazio Carlevaro : « Kom-  
ponanto de lia pensmaniero estis  
amo al sia naska terpeco, la eta  
Tiĉino, kunigita al same forta amo  
por ties kultura patrino, Italio...  
Dotita de poeziema animo, Dante  
Bertolini estis instigita de  
Giuseppe Zoppi, siatempe fama  
itallingva verkisto en Tiĉino,

verki ankaŭ poezie. Sed plej  
grave, Bertolini, perceptinte ties  
mankon, aŭtoris plurajn lerno-  
librojn : sur tiuj libroj minimume  
tri generacioj da tiĉinanoj lernis  
legi. Temas pri parte memrakontaj  
libroj, tre ĉarmaj, kiuj priskribas  
kantonon nuntempe komplete  
malaperintan. Mi mem konservis  
du el ili ('*Marco*' kaj '*Rivabella*',  
por traduki ilin en esperanton.  
Kurioza antaŭsento ! Ĉar mi trovis  
ilin trafaj por infanoj. Nun ili ne  
plu estas utiligataj kiel lernejoj  
libroj, sed oni daŭre reeldonas  
ilin, memorcele. »

Dante Bertolini restis ĉiam vigla  
politikisto, kiu tre aktivis sur loka  
urba nivelo dum multaj jaroj, tio  
kadre de la liberala partio. Al tiu  
aspekto de lia aktiveco esperanto  
ŝuldas placon en lia urbo Locarno.  
Kiam mi havis la okazon diskuti  
kun li pri politiko, mi konstatis, ke  
lia liberalismo estis neniel elit-  
isma kaj reakciema, sed kontraŭe  
vigle laikema kaj popoldefenda.  
En kanton tre katolika kaj sufiĉe  
konservema la sinteno de  
Bertolini estis tre originala. Mi  
malkovris, ke ĝi certe fontas el lia  
origino laborista kaj el bofamilia  
influo socialistema. Lia edzino  
Nora Varesi estis filino de konata  
socialista kuracisto de Locarno.

Kun sia edzino Dante Bertolini  
vivis en grandaj harmonio kaj  
admirema fideleco. Kaj kiam ŝi  
grave malsaniĝis, Dante iom post

iom rezignis je ĉiuj siaj personaj okupoj, eĉ pri la politikaj kaj por-esperantaj al li tiom karaj. Interalie la rezigno viziti la Universalajn Kongresojn estis sentata de li kiel vera ofero. Li fariĝis atentema flegisto, kiel li aludis al mi dum nia lasta renkontiĝo okazinta en Lucerno, kiam sub mia prezido SES elektis lin kiel hororan membron. Al sia edzino li decidis doni siajn lastajn fortojn. Kaj tio fakte plene realiĝis. Nur kelkajn semajnojn li postvivis ŝin, elĉerpinte siajn fortojn kaj verŝajne perdinte propran vivcelon.

Claude Gacond

## Henri Vatré

19.09.1908 – 15.12.1998

Henri Vatré elektis la 15an de decembro - la tagon mem de la Zamenhofa Festo - por trankvile eliri nian mondon. Sed en esperantujo plu daŭros lia influo. Daŭre ne eblos raportoj pri la stilo de niaj verkistoj sen citi fragmentojn el lia ĉefverko *Specimene*, kiun li aŭtoris sub la kaŝnomo Henri Baupierre kaj sen atenti pri liaj leksikaj analizoj de karakterizaj beletraj tekstoj.

Jen kiel tiu sviso naskiĝinta kaj mortinta en Genève sin mem prezentas en la rubriko *Biografietoj* de la duvoluma *'Trezoro* :

*Esperanta novelarto 1887-1986'*, kiun li kunredaktis kun Reto Rossetti. Sub la nomo 'Vatré Henri' troviĝas sendo al Henri Baupierre. Se obee al tiu ordono oni konsultas tiun biogramon, oni legas, ke tiu Baupierre estas franco kaj ke profesie li estas administranto. Jen duonvero. Henri Vatré estas fakte franc-lingva sviso. Sed ĉiam tre mistera li estis pri la propra vivo, pri la deveno ĵurasana de sia familio, kaj pri siaj sintenoj politikaj kaj religiaj, interalie pri sia aktiva pacismo. En la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds oni malkovras, ke Edmond Privat advokatis lian defendon antaŭ milita tribunalo. Sed pri sia kondamno kaj siaj suferoj Henri Vatré ĉiam silentadis. Tre sekreta li ĉiam estis pri si mem, pri sia verkistaj aktivecoj kaj eĉ pri sia profesia kariero de administranto de grava kooperativa loĝejo.

Rilate al lia poresperanta laboro la rubriko 'Baupierre Henri' sciigas, ke li oficis dum du jaroj en la Biblioteko de UEA en Genève, ankaŭ dum du jaroj ĉe la redakcio de *Literatura Mondo* en Budapeŝto kaj ke liaj ĉefaj verkoj estas *Specimene* (1962), *Neologisma glosaro* (1983) kaj tradukoj el Saint-Exupéry: *Nokta flugo* (1983) kaj *Tero de la homoj* (1985). Al tiu listo nepre aldoniĝu

**P.P.**

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

lia poemaro *Disaj gutoj*, kiun eldoni Iltis en 1989. Oni ankaŭ ne forgesu liajn enkondukojn al pluraj gravaj verkoj kaj lian atentegan indeksadon de epokfaraj libroj, inter kiuj *Esperanto en Perspektivo*.

Koncerne al la libro-kolekto *Stafeto* ni atentigu, ke Henri Vatré aktivege helpis al Juan Régulo-Pérez kiel lingva kaj esperantologia konsilanto kaj kiel kontrolisto de la presprovaĵoj. Tiu kunlaboro estis kvazaŭ daŭrigo de lia efika antaŭmilita laboro ĉe UEA kaj *Literatura Mondo*.

Kun Henri Vatré mi havis la honoron aktive kunlabori al la pretigo kaj kontrolo de la libroj *Junaĝa Verkaro*, *Aventuroj de Pioniro* kaj *Vivo de Gandhi*, kiuj rezultas el radioprelegaj manuskriptoj de Edmond Privat.

Malgraŭ sia kreskanta vida handikapo Henri Vatré nelacigeble daŭrigis siajn prileksikajn analizojn de la esperanto-verkoj. Tiurilate tutcerte pluraj el liaj manuskriptoj atendas publikigon, kiel ankaŭ amaso da korespondaĵoj, kiuj malkovrigos liajn tre

aktivajn rilatojn kun pluraj verkistoj. Reinhard Haupenthal, kiu ofte vizitis Henri Vatré dum la pasinta jardeko kaj tial fariĝis heredanto de lia libraro kaj de liaj esperanto-arkivaĵoj, espereble trovos la rimedojn eldonajn por diskonigi tiujn ĉi trezorojn. Li fakte jam komencis tiun aktivecon per la eldono de la festa libro *Speciale por Henri Vatré 80-jara*.

La poeta kariero de Henri Vatré estis komence vigle ligita al tiu de Juliette Baudin (1910-1937), kies poemojn publikigis interalie *Literatura Mondo*. Ŝi edziniĝis al li, sed ne por longe, ĉar ŝiaj malsano kaj morto baldaŭ ombrigis la finon de iliaj geedza vivo kaj labor-restado en Budapeŝt. Ankaŭ pri tiuj ĉi tristaj eventoj Henri Vatré emis sekreti. Tamen kiam mi foje menciis al li tiujn faktojn, kiujn mi malkovris tra legante la revuon *Literatura Mondo*, Henri Vatré esprimis al mi la esperon, ke foje kolekto de lia poemaro ankaŭ inkluzivos versaĵojn de lia unua edzino.

Claude Gacond